

ESPERANTA FINNLANDO

1962

N:o 5

INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

JARKOLEKTO 1962 — 9 numeroj
Abonprezo enlanda 350 mk
eksterlanda 450 mk
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Emil Sten-
holm, Simo Raumavirta.

Redaktejo: Esperantotie 4, IIRIS-
LAHTI (artikoloj, novaĵoj, recenzoj,
interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj
societoj estas varme petataj konstante
kontribui per novaĵoj kaj interesaj
artikoloj, proponoj ktp., por ke nia
gazeto estu vera komuna informilo.

ESPERANTO — AIKAKAUTEMME LATINA

Katsoessaan kuukausi sitten Työväenopiston tämänvuotista opetusohjelmaa, forssalaiset lienevät kiinnittäneet erikoisen huomionsa siihen ohjelman uuteen tulokkaaseen, jonka nimi on esperanto. Sillä monesti kuuli kysyttävän viime kuun aikana, millaista asiaa tämä esperanto mahtaa olla ja millaiseen käyttöön se mahtaa kelvata. Koska ei voi vastata joka kysyjälle henkilökohtaisesti, olemme pyytäneet esperantokurssin ohjaajaa, op. Veera Tiettiä, selostamaan tätä opetusainetta lehdesämme nyt, kun kurssi on jo alkanut ja päätös mahdollisesta osallistumisesta on pian tehtävä. Ennenkuin siirrämme puheenvuoron op. Tietille, kerromme vielä, että esperantokurssissa on lupautunut joskus esiintymään toisena kielimestarina eräs jugoslaviatar, joka oltuaan kurssinohjaajan kirjeenvaihtotoverina nyt valmistautuu pitkähköön Suomenmatkaan — ja muina kielimestareina kerran tai pari myös kurssinohjaajan perheläiset, esim. hänen 2-vuotias tyttärensä, joka tavallisuudesta poiketen on oppinut esperan-

ton äidinkielenään.

Jos keskiajalla olisi kysytty silloiselta kansalaiselta: »Missä maassa puhutaan latinaa?», tämä olisi kai ensi hätään vastannut: »Ei missään maassa!» Mutta tuskin hän olisi pysynyt vastauksessaan korjaamatta sitä sitten: »Latinaa puhutaan kaikissa maissa!» Sama selitys, joka silloin annettiin latinasta, kelpaa nykyisin esperantosta. Ei missään maassa esperanto ole väestön kotioloissaan käyttämä kieli, mutta kaikissa maissa sitä opitaan toisena kielenä, jota ihmiset käyttävät ulkomailla käydessään tai vaihtaessaan ajatuksia ulkomaalaisten kanssa. Esperanto auttaa kaikissa maissa niitä ihmisiä, jotka haluavat olla yhteydessä ulkomaiden ja ulkomaalaisten kanssa.

Monet henkilöt, jotka kaipaavat yhteyttä ulkomaihin, oppivat jotakin vierasta kansalliskieltä niin paljon kuin heidän aikansa ja kielipäänsä sallivat, ja tyytyvät tältä pohjalta odotettavissa olevaan tulokseen. Monet jäävät ilman mitään hyväksikäytettävää saavutusta. Onnekkaammat

hankkivat itselleen, runsaasti aikaa ja vaivaa uhraten, taidon lukea parin suuren maan kirjoja ja sanomalehtiä sekä tulla toimeen ulkomaanmatkoilla junissa ja hotelleissa. Vain harvat kaikkein lahjakkaimmat ja sitkeimmät pääsevät vieraiden kansalliskielten käytössä sanottua edemmäksi, esim. mahdollisuuteen ulottaa keskustelu ulkomaalaisen kanssa yli kohteliaan jaarittelun ja matkateknillisten kysymysten selvittelyn todellisiin asioihin saakka.

Mutta juuri tämä, kirjallinen tai suullinen keskustelu, jossa pohditaan asioita, on jokamiehen saavutettavissa esperanton avulla. Kun viime vuosisadan lopulla mielenkiinto ulkomaihin valloitti entistä laajempia kansankerroksia, antoi puolalainen lääkäri Zamenhof maailmalle sommittelemansa kielen, joka on niin ilmaisukykyinen kuin kansallisetkin kielet, mutta niitä monta kertaa helpompi oppia. Jos vain on tarmoa, omaksuu heikkokin kielipää parissa vuodessa vapaaseen keskusteluun tarvittavan määrän esperantoa.

Esperanton helppous johtuu siitä, että se on rakennettu selviä linjoja pitkin ilman sitä oikullisuutta, joka on yhteinen kaikille kansalliskielille. Äidinkieltään oppiva pikkulapsi huomaa oudoksuen, ettei hänellä olekaan »käsit» vaan »kädet» ja että lääkäri ei tulekaan häntä »terventämään» vaan »parantamaan». Samoin on vierasta kansalliskieltä oppivan aikuisen kartettava vääriä sanoja joka askelella. Esperantossa taas kaikki, minkä järki sanoo oikeaksi, on oikea myös kielen kannalta, ja johdonmukaiset sanasarjat »mano/manoj» = käsi/käsit ja »sana/sanigi» = terve/terventää ovat esperantossa ainoat sopivat. Vierasta kansalliskieltä oppiessa on sullottava päähän pelottava määrä oikullisia puhekaavoja; esperanton opiskelu vaatii sitävastoin vain ajattelun vapauttamista siinä ennestään olevista

äidinkielen mukaisista kiemuroista. »Mano/manoj» esimerkki osoittaa, että esperanton kielioppi on täysin säännöllinen; esimerkiksi »sana/sanigi» taas huomaamme, ettei esperantoa varten opita ulkoa kymmeniä tuhansia valmiita sanoja vaan tuhatkunta kantasanaa, joista kaikki muut sanat muodostuvat selvien ohjeiden mukaan itsestään. Esperanton kantasanat ovat enimmäkseen latinalaista alkuperää, muistuttaen kaikkien kansalliskielten latalaisperäistä sivistyssanastoa. Näihin kantasanoihin lisätty kielioppi ja sananjohtojärjestelmä ovat niin säännöllisiä, että ajattelun päästyä suoriin uomiin esperanton opiskelu on enää melkein vain leikkiä.

Opiskelun päätyttyä uudella esperantistilla on tilaisuus liittyä kansainväliseen esperantoliittoon, jonka vuosikirjassa on lueteltu paitsi esperantonkielistä kirja- ja lehtikirjallisuutta myös maapallon käsittävät esperanton avunantajaverkostot. Toisen verkoston muodostavat paikkakunnalliset avunantajat, joiden puoleen esperantisti kääntyy matkoilla ollessaan tai jonkun paikkakunnan asioita tiedustellessaan, toisen verkoston taas ammattien ja harrastusten avunantajat, joilta esperantisti saa haluamansa tiedot oman ammattinsa tai harrastuksensa muissa maissa saavuttamasta asemasta sekä siinä toimivista esperantontaitoisista henkilöistä. Näiden kanssa syntyy kirjallisia ajatustenvaihtoja, jotka helposti tiivistyvät valtiolliset rajat ylittäväksi ystävyys-suhteeksi; lopuksi tavataankin henkilökohtaisesti jommankumman osapuolen matkustaessa toisen luo tai molempien osapuolten matkustaessa samaan maailmankongressiin. Muutkin piirit järjestävät yhdessäoloja, joille vieraskansalaisille osoitetaan ystävyttä; mutta kerran vuodessa pidetyt esperantokongressit ovat ainoat sellaiset, joiden osanottajat vaivatto-

Babilo de Lilo

Inter la civitanoj de Esperantujo regas intima, frateca spirito. Ĉiu verdstelano, kiu okaze vidas la verdan insignon sur la brusto de alia homo, nepre salutas kaj komencas interparoli, kvazaŭ kun parenco. Kompreneble ni ankaŭ invitas "la parencojn" en niajn hejmojn kaj regalas ilin. Almenaŭ por esperantistoj, kiuj ne hava eblecon vojaĝi eksterlande, tiaj vizitoj donas bonan okazon uzi la lingvon praktike. Tial oni, laŭ la finna kutimo, regalas eksterlandan gaston "kiel episkopon en pastrejo".

Tamen ankaŭ la gasto, eĉ parenca, havas devon bone konduti, kaj dum la vizito kaj poste. Dezirinde estas danki. Plej ofte tiel okazas. Sed mi aŭdis, ke oni iam forgesas tion. Estas malagrebale, eĉ ofende precipe por la dommastrino, kiu ja havis ekstran zorgon pro la manĝoj kaj litoj.

Ekzistas friponoj, kiuj misuzas Esperanton por propra profito — vojaĝas tra landoj, loĝas kaj manĝas ĉe "samideanoj", pruntepetas monon ktp. Pri tiaj uloj mi aŭdis, sed feliĉe ne renkontis.

Ni konduitu kiel diras Zamenhofs proverbo: "ni amu nin frate, sed kalkulu akurate". Almenaŭ ni danku pro la samideana gastameco!

Esperanto estos oficiala tutmonda dua lingvo de ĉiu klera homo. Tiam

man keskustelun ansiosta jopa unoh-
tavat olevansa eri kansaa.

Keskiajalla on ollut säätyläisille varattu latinansa. Uusi aika on saanut jokamiehen ulottuvilla olevan esperanto-latinan. Runsas joukko nykyajan ihmisiä käyttää sitä hyödykseen jo tässä vaiheessa odottamatta kunnes se on kerran virallistakin.

Veera Tietti.

Edelläoleva kirjoitus on julkaistu Fors-
san Lehdessä, N:o 230/1961.

la esperantista movado, la kluba vivo, la frateca samideana spirito perdos sian celon. Sed ĝis tiam ni ĝuu la avantaĝon, kiun ni havas per la Internacia lingvo tiel, ke precipe la eksteruloj ne trovu kaŭzon riproĉi nin pro malbona aŭ stranga konduto.

* * *

En sia kongresa festparolado nia fama oratoro Ivo Lapenna emfaze akcentis la signifon de la ekzercado de la lingvo en niaj kluboj. "Kien iras la miloj, kiuj ĉiujare eklernas la Internacian lingvon por praktiki ĝin? Kie estas la lando, en kiu Internacia lingvo estas parolata? Ĝi ne ekzistas, sed ĝin devas unuavice anstataŭigi la lokaj Esperanto-societoj".

Tro ofte oni en niaj kluboj babiladas en la nacia lingvo — pretekste pro la komencantoj. Tiamaniere ili ankaŭ restos por ĉiam komencantoj kaj iom post iom perdiĝos.

En kunveno de mia klubo unu membro petis parolon kaj aklamis: "de post nun mi ĉiam parolos nur Esperanton dum la klubvesperoj". Li estis leginta la paroladon de Lapenna, Mi dezirus, ke prof. Lapenna ĉeestus en nia kunveno por aŭdi tiun resonon de sia alvoko! Ĝuste por la komencantoj la pli progresintoj parolu Esperanton. Oni decidis, ke en nia klubo ĉiu plilertulo, por sia propra utilo kaj por utilo de la komencantoj, parolas nur Esperanton dum la kunenoj tutan vesperon. La komencantoj preparos sin por duonhora programo en Esperanto. Certe ankaŭ ili iom post iom konstatos, ke ili plu ne estas komencantoj. Ankaŭ dum la tempo inter kunvenoj renkontante samklubanon oni devus interparoli en Esperanto. — Do: malaperu la eternaj "bonan tagon-esperantistoj"!

Lilo



ESPERANTO KURSOJ KAJ EKSPOZICIO EN HEINOLA

Laborista instituto de Heinola aranĝis elementan kurson en esperanto dum pasinta printempa agadperiodo. Kvankam la kurso komencis en januaro kiam jam la geinstitutanoj aŭtune elektis siajn studobjektojn, sufiĉe multaj povis partopreni ĝin. Frekventis regule ĝis fino pli ol dek gekursanoj. Kiel kursgvidanto estis S-ro Eero Laitinen, kiu bone sukcesis en sia unua provo kiel instruisto. Ni esperas sekvontaŭtune starti eĉ pli multnombro.

29. 4.—1. 5. estis tritaga ekspozicio de interesigaĵoj de diversaj grupoj kiuj funkcias inter laborista instituto kaj setlementa liberinstituto Jyränkölä, kiuj laboras kune. Ekspoziciataj estis: Skulptaĵoj, pentraĵoj, porcelanpentraĵoj, teksaĵoj k.t.p. Ankaŭ »nova veninto» esperanto havis ekspozicieton, bone sukcesintan. Montriĝis ke ekzistas multaj homoj kiuj volas scii pri nia lingvo kaj movado, sed kiuj ĝis nun ne sufiĉe konatiĝis kun ĝi. Ni havis

okazon klarigi al ili.

Aparte ni ĝojas pri la vortoj favoraj al esperanto kiujn diris la direktoro de la institutoj S-ro Tuure Laitinen (ne parenca al nia studgvidanto Eero Laitinen) okaze de la ĉi-printempa laborfiniĝa festo de la institutoj 29. 4. En lia parolado li diris inter alie: Ke li aparte ĝojas pri la staro de nova lernobjekto esperanto kies kursanoj montris siajn kapablojn povante krom diri »bonan tagon kaj ĝis revido» multe, inter tiuj frazoj. Ke li kiel setlementano opinias ke esperanto estas tre taŭga kiel setlementa lingvo. Li komparis esperanton kun angla, dirante ke per angla lingvo ne estas ebla tiel bone kiel per esperanto atingi interkontaktojn kun diversaj eĉ malproksimaj landoj, ĉar esperantistoj ja troviĝas en ĉiu loko en la mondo. Fine li diris ke li atendas »atakon» al sekvontaŭtuna esperanto kurso. Ni esperu tiel!

Ho Ve.

ATENTO, DANĜERO

Ni estas en Finnlando iom flankenlasitaj, tion faras nia geografia situo. Tial, ŝajnas al mi, ke ni finnaj esperantistoj ne tre bone estas konsciaj pri la danĝera kaj pereiga batalo kiu uraganas en nia movado. En la internacia nivelo nia movado splitiĝis en tri grupojn: atistoj, itistoj kaj esperantistoj. La du unue menciitaj grupoj akre batalas pri la uzo de pasivaj participoj en kelkaj okazoj, afero, kiu neniel kaŭzis nekonvenaĵojn al la tria grupo. Nature, la anoj de la du batalantaj grupoj estas esperantistoj ankaŭ, sed ili forgesis la devizon, kiun UEA mem uzis dum la postmilitaj jaroj: Unueco estas forto. Kio estas plej danĝere, estas tio, ke la stevenaj figuroj en ambaŭ grupoj estas plej eminentaj esperantistoj, eĉ tiaj, kiuj ĝis nun neniel penis suprenpuŝi sian propran personecon, sed nur nian lingvon kaj movadon. Nun ili forgesis kiel oni pace laboras por nia afero, ili nur senĉese kaj

sensence kverelas. Kaj kio estas plej malbone, estas, ke ili ambaŭ nekorrekte prezentas sian aferon. En ambaŭ tendaroj aperis dokumento en presita formo: la atistoj publikigis broŝuron en kiu klarigas sian vidpunkton, kaj la itistoj publikigis dikan libron, kiun ili nomas »simpozio«. Tion simpozion ni aĉetis, nesciante kian enhavon ĝi en si entenas. Tuj leginte ĝin, ni povis konstati, ke la publikinto ne komprenis aŭ ne volis kompreni kion signifas la vorto »simpozio«. Nu, en nia aŭtuna numero ni recenzos la libron, postkiam ni ĝin pene analizis. Intertempe ni avertas al ĉiuj, kiuj ne havas tre profundan lingvoscion: ne legu ĝin, vi povus ricevi malĝustajn ideojn pri la graveco de unusola kaj — kompare kun la tuto — sensignifa afero! Por konservi la laborpacon en nia movado, ni sugestas, ke vi ĉiuj legu, kion niaj norvegaj amikoj sugestas en la sekvanta:

REZOLUCIO.

La Konsilantaro de Norvega Esperantista Ligo, konstatinte.

1. ke dum 75 jaroj la esperantistaro perfekte interkompreniĝas, kvankam iuj havas unu vidpunkton rilate la pasivajn participojn -ata kaj -ita, kaj aliaj havas alian vidpunkton,

2. ke tiun demando neniam povos solvi kampanjoj, decidoj kaj rezolucioj, sed nur senpasiaj sciencaj studoj kaj la lingva evoluo mem,

3. ke dum la lasta tempo grupo da senrespondecaj fanatikuloj el unu el la du partioj entreprenis danĝeran kampanjon, kiu minacas dissplitigi la Esperanto-movadon kaj konduki al fatala skismo,

4. ke ne la diverseco de opinioj rilate la du participajn formojn, sed la menciita kampanjo de netoleremo prezentas seriozan danĝeron por la

unueco de la Esperanto-movado, Flanken lasante la temon mem, kiu el la du partoj estas prava rilate la partiparan demandon, ni alvokas al ĉiuj seriozaj esperantistoj,

1. ĉesigi ĉiujn publikajn disputojn pri la partipara demando;

2. ĉesi diskuti pri Zamenhofs aŭ ne-Zamenhofs lingvouzo, sed amike kunlaboradi laŭ la Zamenhofs spirito,

3. unuigi ĉiujn siajn fortojn en konstrua laboro por antaŭenigado de la universala Esperanto-movado laŭ la devizo de Universala Esperanto-Asocio: »Unueco estas forto«.

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
por la Konsilantaro

C. Støp-Bowitz
prezidanto.

Vidar Vik
ĝenerala sekretario.

FRATOJ ATO KAJ ITO

Fratoj Ato kaj Ito posedas aviadilon Fantazio. Ili povas flugi per ĝi en spaco kaj tempo. Dum unu flugo la pli maljuna frato Ato parolas: »Ni baldaŭ preterflugos aeronaŭtan lumturon, en kiu servas mia amiko. Li promesis saluti nin dum nia preterflugo per malfermo de unu fenestro. Estos interese vidi, ĉu li scias saluti nin ĝustatempe. — Jen, la turo jam estas videbla. Tuj ni preterflugos ĝin. Kaj nun, vidu, unu fenestro malfermiĝas, ĝi estas malfermata de amiko. Li salutus nin.»

Ito respondas: »La turon mi bone vidis, sed ne la malfermiĝon de la fenestro. Nur momenton pli malfrue mi vidis la malfermitan fenestron.»

Ato: »La saluto estis ĝuste la malfermiĝo de de la fenestro. Kio malhelpis vin vidi la okazon, ne nur la staton post la okazo?»

Ito: »Tiu ago estis momenta, ne eblas vidi ĝin. Ekzistas »aspekto«, kiu malhelpas vidi tian agon, sed la staton post la ago oni povas vidi.»

Ato: »Bedaŭrinde viaj okuloj sufe-

ras pro »aspekto«-malsano, sed espreble tia malsano estas nur epidemio, kiu nur iam kaj tiam suferigas homojn.»

* * *

Verŝajne la sama aspekto-malsano suferigis la civitanojn de Esperantujo antaŭ 30—40 jaroj, ĉar la Kompleta Gramatiko de Paul Fruictier, aperinta 1930, skribas sur paĝo 110 jenon: »Tre certe la kvazaŭĉiama uzado de ita estas tre oportuna por multaj personoj pro niaj nacilingvaj kutimoj, ĉar en multaj naciaj lingvoj ekzistas nur unu (pasinta) pasiva participo. — — — Tial, laŭ mia opinio, oni povas rekomedi la preferan uzadon de ita nur provizore kaj al tiuj personoj, kiuj estas embarasataj de la diferencigo de ata kaj ita. — — — Sed la forlaso de ata estus tre bedaŭrinda, se ĝi ĝeneraliĝus, ĉar ĝi rompus la harmonian simetrian, kiu ekzistas inter la formoj aktivaj kaj pasivaj de nia verbo kaj tio senigus nian lingvon de ŝatinda pensesprimilo.»

DATREVENOJ

Multaj samideanoj atingis aŭ atingos gravajn mejloŝtonojn de siaj vivoj dum la kuranta jaro. Ni volas esprimi nian gratulon kaj dankon pro multjara servado al nia komuna afero, por sekvantaj amikoj:

80-jara

Instruisto Alpo Suomalainen, 5. 4.

70-jaraj:

Instruisto Ilmari Rautio el Suomenlinna, 2. 5.

Dipl. Inĝ. Erkki Härkönen el Lauttasaari, 1. 6.

Instruisto Esko Kyöstilä el Munkkivuori, 12. 6.

Flegistino Johanna Pohjolainen el Kemi, 21. 8.

Profesoro Uuno Pesonen, el Helsinki, 16. 7. Profesoro Pesonen estas mal-

nova samideano, li partoprenis jam en 1910 al la funkciado de studenta Esperanto-asocio, kies unu establan-
toj li estis.

60-jaraj:

Suoma Vilkki, 4. 6.

Marke Setälä, 24. 6.

Irja Sivula, 17. 8.

Ankoraŭfoje: koran gratulon!



NI FUNEBRAS

Teknikisto Urho Rautiainen, nask. 24. 6. 1887, mortis la 30an de marto. Li estis eminenta esperantisto, UEA-delegito por loga tempo, membro kaj prezidando de Norda Lumo, esperantista klubo en Kemi. La finlanda esperantomovado perdis kun li tre gravan funkcianton.

FERVOJISTA MONDKONGRESO

14a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso okazis en Budapeŝto inter la kvina kaj dekunua de majo ĉi-jare. Partoprenis 11 finnoj, kaj kiel oficiala reprezentanto te finnaj fervojistoj-esperantistoj funkciis trafikinspektoro Niilo Narvala el la fervojista administrejo. Pri la kadroj kaj okazaĵoj de la kongreso estu rakontite:

El la ĝisnunaj fervojistaj esperantokongresoj la budapeŝta estis plej granda kaj pompa. Okupiĝo pri esperanto estas en Hungario tre vaste disvolviĝinta, kaj la organizintoj de la kongreso ricevis ampleksan subtenon eĉ fare de registaraj instancoj. Ni konstatu, ke la ĉefa protektanto de nia kongreso estis la komunikada ministro Stefan Kossa, kiel subaj protektantoj aliaj altrangaj fervojistoj. Esperanto-movadon en la protektantaro reprezentis samideano Julio Baghy. Ĉar la problemoj pri vizoj kaj loĝado estis prizorgitaj senfrikcie, povis la nombro de ĉeestantaro superi milon! Kongresanaro konsistis el vera multnacia amaso, estis tie partoprenantoj el eĉ Sovet-Unio kaj Egiptujo.

La oficiala programo enhavis grandajn komunajn aranĝojn kaj laboradon en malpli grandaj grupoj. Malferma solenaĵo okazis laŭkutime dimanĉe je la 10a horo. Pri la programo ni menciuj nur, ministro Kossa salutis en esperanto, ke ĉiulandaj oficialaj reprezentantoj ĉiuj prezentis sian saluteton, kaj ke la Budapeŝta Fervojista orkestro ludis. La faka preparolado ĉi-foje temis pri senbreĉaj fervojlinioj kaj betonaj ŝpaloj. Per tiuj la hungara fervojo faris pionirajn eksperimentojn. Speciala laborsekcio pritraktis la jam dum jaroj pripensitan demandon pri fakterminaro fervojista kaj ĝian oficialigon kaj standardigon.

Por kongresanoj oni aranĝis ankaŭ du tuttagaj ekskursoj al la kamparo: la unua en la nordhunga-

LA HEJMO DE H. C. ANDERSEN

La vojaĝanto, kiu iras de la eŭropa kontinento al Kopenhago laŭ la bonega aŭtovojo, kiu transiras la insulon Føn, devas traveturi la malnovan urbon Odense. Tuj je lia alveno, indikiloj kaj sagoj direktas lin al Hans Jensenstraede, pitoreska strato de malnovaj domoj, inter kiuj troviĝas la naskiĝdomo de verkisto konata de infanoj tra la tuta mondo: Hans Christian Andersen.

Jam ne restas postsigno de la simpla ŝuriparejo, kie la patro de Andersen pene perlaboris vivrimedojn por sia familio. Anstataŭe, bone aranĝitaj ĉambroj ebligas al la vizitanto sekvi la stadiojn de la kariero de la verkisto. La meblaĵoj de liaj dormĉambro, laborĉambro, biblioteko kaj kuirejo estas tie, kaj ankaŭ liaj personaj posedaĵoj: liaj rajdbotoj, lia pipo lia inkujo. Memoraĵoj pri lia literatura aktivado abundas en la muzeo. Troviĝas tie manuskriptoj, aŭtografoj, leteroj, ekzempleroj de preskaŭ ĉiuj danaj eldonoj de liaj fabeloj, rakontoj kaj dramoj, tradukoj en multaj lingvoj inkluzive Esperanton, ilustraĵoj, diplomoj, medaloj, gravuraĵoj, kaj pluraj desegnaĵoj sur kolora papero faritaj de Andersen mem.

Scenoj el liaj fabeloj kaj portretoj de iliaj ĉefaj roluloj ornamas la murojn de la memorhalo.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Infoservo)



rian altlandon kun vizito en la staltita kavo ĉe Aggtelek, la dua al la lago Balaton.

La kongreson favoris plejparte bela somereca vetero. Budapeŝto, la antaŭa perlo de Danubo, sin prezentis rekonstruita kun siaj imponaj pontoj en la verdo kaj florbrilo de somerkomenco. Kongresanoj havigis tre bonan bildon pri la cirkonstancoj en hodiaŭa Hungario.

**INTERNACIA KRISTANA FRATARO
FINNLANDA SEKCIO.
JARRAPORTO.**

En jaro 1961 membronombro de sekcio plu restis stabila, estante do 39. Tamen ni ne scias adreson de 5 fratoj, do ni havas kontakton kun 34 gefratoj.

En jaro 1961 aperis nova organo de IKF, »La Spirita Vivo» unu foje. Pro tre longa tempa malsano Livingstone Jenkins ne povis aperigi pli multajn numerojn de la gazeto. Kiel kutime L. Jenkins sendis al nia sekcio diversajn presajojn por disdoni kaj korespondi. Nia sekcio aperigis 4 cirkulerojn. Plej granda akiraĵo por eldona agado estas, ke Olavi Peltonen nune disponas multobligilon. Ĉe jarfino oni decidis aperigi propran organon kun nomo »Kristana Frataro».

Olavi Peltonen ricevis en jaro 1961 159 poŝtaĵojn kaj sendis 253 poŝtaĵojn. Korespondo konsistis el kontakto kun en- kaj eksterlandaj gefratoj, de sendo de literaturo, gasetoj, cirkuleroj, artikoloj al gazetoj kc.

Jarkunsido okazis 25. 6. 1961 en Laihia ĉe Hugo Salokannel. Li aranĝis lokan kunsidon 26. 11. en lia hejmo. Salokannel faris 9 parolojn kaj prelegojn. Aŭskultantoj estis 62.

Nia agado forte suferis pro la malsano de Livingstone Jenkins, J. V. Pukkila kaj Salokannel. Pukkila devas jam preskaŭ du jarojn resti en malsanulejo. Hugo Salokannel estas preskaŭ blinda. Lin grandvalore helpis lia filino Hilikka Hölsö, kiu helpis lin en korespondo.

Observante tutecon de nia agado dum 1961 oni povas vidi tendencon al vigliganta agado. Kun pli granda espero, oli ĝis nun ni povas komenci novan laborperiodon.

O.P.

LA ALAŬDO.

A. Rahkonen

Alaŭdan kanton aŭdas ni,
nordanoj, frusomere.

Salutas hejman landon Vi,
birdeto, alt-aere.

Plej ĉarme sonas via tril'
sub norda nur ĉielo,
flugadas Vi jam en april'
ĉe hela nubniveło.

Vi kial lasas sudon for,
rapidas al Finnlando? —

— Plej kara ĉar por mi trezor'
ĉe arkta kuŝas rando.

Pli bela lando subas ne
ĉielan firmamenton.

Beleco ĝian re kaj re
ravegas mian senton.

Trad. P. Riihivaara

Infaneto, dormu pace! Kaj se vi ion
bezonos, voku tuj al patrino, patro
tiam venos vidi vin!

*

JURNALO KAJ GAZETO.

Iu juna esperantisto min foje demandis: kiel diferencas gazeto kaj ĵurnalo? Poste mi rimarkis en esperantaj gazetoj ankaŭ indikojn pri tio, ke ĉiuj ne klare vidas la diferencon. Mi iom klarigu: Ambaŭ estas presajoj aperantaj pli malpli regule (eĉ neregule, kiel EF, trajto, kion ni klopodas forigi, kaj kiu parte tenditaj, ĉefe eksterlandaj, vojaĝoj dependas de multaj kaj tute neade redaktanto). Ni povas diri, ke ĉiuj ĵurnaloj estas gazetoj, sed ĉiuj gazetoj ne estas ĵurnaloj. Esperanta Finnlando estas gazeto, ankaŭ Heroldo de Esperanto estas gazeto, sed ĝi havas formon kaj aspekton de ĵurnalo, aŭ taga gazeto, kiel oni ankaŭ povas la ĵurnalon nomi.

Lingvohistorie la vorto »ĵurnalo» estas francdevena ero de nia lingvo. En franca ĝi aperas kiel »journal», la bazo estante »jour», kiu signifas tago. Do, jam dependante de la deveno la vorto ĵurnalo signifas tagan gazeton, ĉiuj aliaj gazetoj estas nur — gazetoj!

SR

